**PILO-PRESS**
Internacia
Informservo

N-ro 49/76 - 20 dec 1976
Aperas ĉiusemajne

EUROPA ESPERANTO-KONGRESO 27-31 majo 1977 PADERBORN

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69



Paderborn atendas vin!
Aliĝu al la Eŭropa Esperanto-Kongreso!

Al ĉiuj abonantoj kaj legantoj

ni deziras agrablajn kaj ĝojoplenajn

festotagojn kristnaskajn

************************************************************

## Pri la Esperanto-vivo en Poltavo

Poltavo (pp) - Poltavo, la ukraina urbo en Sovetunio, estas historia kaj moderna urbo. En la jaro 1974 la poltavanoj povis festi la 800an datrevenon de la urba fondiĝo, kaj en la jaro 1709 okazis la fama batalo de la rusoj kontraŭ la svedoj.

Poltavo estas la industria, scienca, kultura kaj administra centro de la poltava regiono. Vivas tie 260 000 enloĝantoj.

Ĝis aŭtuno 1975 en Poltavo fruktodone laboris nur la Esperanto-Klubo ĉe la fakultato de sociaj profesioj de la Poltava Agrikultura Instituto. En septembro 1975 la Urba Komitato de Komsomolo subtenis la iniciaton de Esperanto-entuziasmuloj fondi urban Esperanto-klubon de studentoj, lernantoj, oficistoj kaj laboristoj. La ĉefa tasko de tiu klubo estas kune kun la Kluboj de Internacia Amikeco evoluigi kaj profundigi la amikajn ligojn kun eksterlandaj samaĝuloj "surbaze de soveta patriotismo kaj proleta internaciismo pere de Esperanto-korespondado".

Direktorino Jelena Frolovna Rabotina kaj vicdirektorino Roza Semjonovna Miĥajlenko de la Poltava Kulturdomo de Sindikatoj, kie lokiĝas la Poltava Esperanto-Klubo, kreis ĉiujn necesajn kondiĉojn por enhavoriĉa funkciado de la klubo, plene subtenas ĉiujn interesajn kaj necesajn Esperanto-entreprenojn. Ekzemple 50 geaktivuloj el 18 ukrainaj kaj rusaj urboj de la suda regiono de Sovetunio renkontiĝis ĉi-printempe en tiu kulturdomo. Kaj en tiu kulturdomo la 15-an kaj 16-an de majo 1976 okazis la unua konferenco de Ukraina Societo de Esperanto-Aktivuloj (USEA). Ĉi-okaze estis aranĝita en la kulturdomo granda Esperanto-ekspozicio.

Vasilij V. Grigorenko, prezidanto de la Poltava Urba Esperanto-Klubo, skribas:

"La poltavaj geesperantistoj ĉiusemajne aktivas en kursoj, aranĝas Esperanto-ekspoziciojn, fotomontaĵojn kaj standojn; radias, publikas kaj prelegas pri Esperanto kaj organizas diversajn renkontiĝojn kaj amikecvesperojn kun koncertoj en la lingvo Esperanto; partoprenas en respublikaj kaj tutuniaj Esperanto-renkontiĝoj kaj seminarioj. Ekzemple poltavanoj ĉi-jare partoprenis en la ukraina renkontiĝo en Doneck, en ĉebalta renkontiĝo-seminario "Esperanto kaj Naturo"-VII kaj la lasta 18-a Sovetia Esperantista Junulara Tendaro (SEJT-18). En Esperanto aktivuloj prelegas en sciencaj konferencoj ofte kun originalaj kaj tre viglaj temoj, kiel ekz. "Esperanto kaj kosmo", kiun preparis kaj prelegis en scienca konferenco ĉe Poltava Agrikultura Instituto la studento el ĝi Petro Paŝĉenko. Kaj kompreneble ni korespondas ne nur kun samaĝuloj el diversaj urboj de

Pri la Esperanto-vivo en Poltavo (daŭrigo)

Sovetunio, sed ankaŭ kun multa nombro da geesperantistoj preskaŭ el 50 landoj de Eŭropo, Azio, Afriko, Ameriko, Aŭstralio kaj Oceanio.

La poltavaj geesperantistoj multjare estas en la vicoj de la plej aktivaj en Sovetunio. Lastjare ni en la socialisma konkurado de la Esperanto-agado de la Esperanto-kluboj de nia patrujo okupis la kvaran lokon kaj ĉi-jare la Poltava Urba Esperanto-Klubo okupis la unuan lokon. Granda sukceso!"

Adreso de la kluba prezidanto: S-ro Vasilij V. Grigorenko, ul Giolkovskogo 67, kv. 197, SU-314028 Poltavo, Ukrainio, Sovetunio.

Se legantoj volas korespondi kun poltavaj geesperantistoj, ili skribu al la supra adreso!

Gastejo Edmond Privat

La Chaux-De-Fonds (pp) - Gastejo Edmond Privat nun estas en starigo. Ĝi celas meti je la dispono de la kursanoj de Internacia Feria Altlernejo, de la kunlaborantoj de Kultura Centro Esperantista kaj de feriantoj moderprezankaj mezkomfortan restadejon.

Situo: Gastejo Edmond Privat situas en la montaro Ĵuraso je 1100 m de alteco, borde de la urbo La Chaux-De-Fonds, en ege kvieta kvartalo. En tuja proksimeco troviĝas vastaj paŝtejoj kaj arbaroj.

La ĉambroj estas unu-, du-, aŭ kvar-litaj. La komuna vivo estas bazita sur la principo de mem-mastrumado. Dank' al tio la restadprezoj estas ege malaltaj.

Nuntempe estas jam je dispono 12 litoj; 2 en unulitaj ĉambroj ( 8 sfr.); 4 en 2-litaj ĉambroj ( 6 sfr.); 6 duetaĝaj - 4 en unu ĉambro kaj 2 en alia (3 sfr.)

Lit-rezervado: Oni skribe informiĝu, ĉu la dezirata(j) lito(j) estas libera(j) en la antaŭvidita restad-periodo aldonante 2 internaciajn respondkuponojn ĉe Gastejo Edmond Privat, Kultura Centro Esperantista, Poŝtfako 621, Postiers 27, CH-2301 La Chaux-De-Fonds, Svislando.

SEL-Seminario ne okazos

Saarbrücken (pp) - La 2-a Internacia Esperanto-Seminario de SEL kaj SOGELO, antaŭvidita en Neustadt/Weinstr. de la 26.12. - 2.1.77, ne okazos pro manko de sufiĉaj partoprenontoj.

Kunlaboro kun Junaj Eŭropaj Federalistoj

Komence de novembro Yashovardhan kaj Hartmut Trunte partoprenis seminarion de Junaj Eŭropaj Federalistoj (JEF), ne-esperantista organizo, financitan de societo Friedrich Ebert, pri la temo "La nova monda ekonomiordo". La seminarion partoprenis 28 junaj homoj (16 - 30-jaraj), el kiuj post informado 15 eksplicite petis pluajn informojn pri Esperanto, du restos en kontakto kun Esperantista Grupo Universitata Bonn kaj du jam partoprenas Esperanto-kurson. EGU Bonn planas daŭre informadi JEF-on, formi esperantistan premgrupon interne de JEF por organizigi ilin seminarion pri la lingva problemo en Eŭropo. Estus bone, se esperantistoj en aliaj lokoj kaj landoj same kunlaborus kun JEF. Petu informojn de JEF-Bundesvorstand, Arndtstr. 25, D-5300 Bonn 1, aŭ de JEF-Europa, 49 rue de Toulouse, B-1040 Bruselo.

Informoj pri Esperanto

La franclingvaj servoj de germana radio (Deutschlandfunk) plurfoje menciis Esperanton lige kun kongresoj, plurlandaj renkontiĝoj ktp.(lgtx)

Pri Eŭropa Esperanto-Revuo

N-ro 6 de Eŭropa Esperanto-Revuo nun estas presata kaj aperos fine de decembro 1976. N-ro 7 + 8 aperos en januaro 1977 kiel duobla numero en amplekso de 20 paĝoj.

Kiel ni jam informis, Eŭropa Esperanto-Revuo aperadas ankaŭ estonte kiel sendependa internacia Esperanto-gazeto sen ligo al iu ajn Esperanto- kaj alia organizo. N-ro 1/1977 aperos en februaro 1977.

La jara abono al Eŭropa Esperanto-Revuo estas 16,- GM. Abonojn akceptas: Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, PSchK Nürnberg 819 56-851, Stadtsparkasse Nürnberg 1.901.579.

Provekzemplero senpage!

Homoj kaj Nomoj
kun kaj sen Renomoj

Nikolaj Starodubcek, Doneck, Sovetunio, skribis, ke dum la librofoiro en Frankfurt/M, la 19-an de septembro, la prezidanto de Ŝtata Eldonkomitato en USSR, V.I. Stukalin, en sia intervjuo al televido de Federacia Respubliko Germanujo parolis pri la multigo de libro-interŝanĝo surbaze de la decido de Helsinki. "Ĉu vi ne provis proponi tian interŝanĝon de Esperanto-libroj", N. Starodubcek demandis Libroservon Pickel, kaj aldonis: "Estas ja konate, ke USSR havas pli ol 50 000 potencialajn legantojn de tia literaturo. Kaj ankaŭ en Sovetunio estas eldonataj Esperanto-libroj en la eldonejo "Eesti raamat". Temas pri "Kalevipoeg", "Tallinn", "Okupacio", "Estonio" ktp.

Prof. Dr. Helmar Frank, Paderborn, parolis dum la Zamenhof-festo de Europa Klubo, la 12-an de decembro, pri la temo "Kial ĝuste Esperanto?" Dum la sama solenaĵo Richard Schulz, Minden, rakontis pri la "Estiĝo de la Esperanto-Lingvo".

Prof. Dr. Viktor Falkenhahn, Humboldt-Universitato Orienta Berlino, prelegis pri la temo "Pri la fontoj de Esperanto" dum la Zamenhof-festo de la Distriktaj Labor-rondoj Esperanto Halle kaj Leipzig, en la Pola Informa kaj Kultura Centro Leipzig, GDR, sabate la 18-an de decembro.

Vasilij V. Grigorenko, prezidanto de Poltava Urba Esperanto-Klubo, Sovetunio skribas: "Laŭ mia opinio al geesperantistoj interesas scii, kiel vivas, kion faras gesamideanoj el aliaj Esperanto-kluboj en diversaj landoj. Tial mi opinias, ke necesas pli ofte kaj pli detale skribi pri tio...Ekzemple mi okupiĝas pri Esperanto ekde fino de februaro 1975, kaj multe ne scias pri Esperanto-agado eksterlande, sed tre volus pli multe ekscii pri ĝi..."

Esperanto en Radio

Zagrebo: Post la "informoj el Jugoslavio" oni povis aŭdi interesan sonraportaĵon pri la ĉi-jara Zamenhof-festo en Zagrebo. En venonta elsendo, vendrede je la 24,05 h, la Esperanto-redakcio donos "respondojn al siaj aŭskultantoj".

Pekino: La vendreda kaj sabata elsendoj estis bonege aŭdeblaj en Nürnberg kaj disaŭdigis ampleksajn komentariojn pri la nuna situacio en Ĉinio post likvido de la "kvaropa bando"

Svisa Kurtonda Servo: Sinjoro Gacond raportis interese pri siaj spertoj dum la konferenco en la Esplorcentro Paderborn.

Varsovio. Interesa rubriko "El la vivo de PEA", kiu valorus detalan komenton. - Ĉu la nombro de korespondaĵoj 1976 superos la nombron 6000? Ni atentigas pri la aktuala konkurso de Pola Radio. Respondojn oni sendu ĝis la 31.12.76

# Konkurso de Pola Radio

10-tagaj ekskursoj tra Pollando

Valoraj objektaj premioj

estas akireblaj de niaj aŭskultantoj kaj legantoj, kiuj donos respondojn al jenaj demandoj:

1) Kiujn polajn artiklojn oni povas aĉeti en via lando kaj kiel vi pritaksas ilin? Kiuj polaj artikloj (produktoj) ĝuus tie sukceson?

2) Kiel vi vidas la perspektivojn de la plua evoluo de la kunlaboro de via lando kun Pollando? Kio, laŭ via opinio, influis aŭ povus kontribui al plivastigo de tiu ĉi kunlaboro?

3) Kiel vi pritaksas la servan agadon de polaj transportaj entreprenoj (Polaj Aer-Linioj "LOT", Polaj Oceanaj Linioj, Internacia Aŭtomobila Transportado "PEKAES", Polaj Stataj Fervojoj) kaj de la Turisma Oficejo "ORBIS"?

Respondo jam al unu el la supraj demandoj rajtigas al partopreno en lotado de la premioj.

La leterojn ni petas sendi laŭ la adreso:

Pola Radio, Esperanto-Redakcio, PL-00-950 Warszawa 1, Poŝtkesto 46, Pollando - en kovertoj signitaj per la devizo: "Konkurso", ĝis la 31-a de decembro en la 1976-a jaro (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultojn ni anoncas en la disaŭdigoj de la Pola Radio por Eksterlando la 31-an de januaro en la 1977-a jaro kaj en la marta numero de la monatrevuo "Polska" (Pollando).

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la organizantoj de la konkurso.

Ni deziras bonŝancon en la lotumado de la premioj.

Partoprenu la konkurson mem kaj partoprenigu aliajn!

Polskie Radio Warszawa

Pola Radio disaŭdigas trifoje ĉiutage en Esperanto:

| | |
|---|---|
| 6,00 horo | ondolongoj: 41 m, 49 m, 75 m, 200 m |
| 16,30 horo | ondolongoj: 25 m, 31 m, 41 m |
| 22,30 horo | ondolongoj: 41 m, 49 m, 75 m, 200 m |